

Fininte belan vojaĝon.....

La Laborista Esperanto-grupo de Lozano, Svisio, povas noti novan, grandan sukceson pro 15-taga vojaĝo al nordaj landoj, kiu glatis laŭprograme dank' al la helpo de diverslandaj esperantistoj k dank' al bela vetero. Post trapaso de l' Rejna valo k vizito de l' Ford-fabrikejoj en Kolonjo ni konkludas, ke la prezroj ja estas altaj en Germanio, sed la loĝantoj ne ŝajnas malsati, nur loĝas ili mizere pro la milita detruado. La sociaj kondiĉoj similas iom la svisajn, estas eĉ pli bonaj ol en iuj inter niaj kantonoj.

La trian tagon ni estis en Amsterdamo, kie ni havis la feliĉon loĝi en komunuma gastejo „De Laurier“, bonega hotelo ŝtate subvenciata, destinata ekskluzive al eksterlandaj turistaj grupoj, kun 350 litoj (la plej malgrandaj ĉambroj entenas kvin litojn). La manĝoj estas bonegaj k abundaj, k oni pagas apenaŭ 5 svisajn fk. tage. Tiu gastejo meritas esti konata k povus servi kiel modelo por aliaj landoj, k aparte por Svisio.

Esperantistaj spertuloj gvidis nin tra la urbo k tra la haveno. Poste ni ekskursis al la rava urbeto Monnikendam, kies urbestro kiel esperantisto salutis nin; ŝpo kondukis nin al Marken, alia al la fiŝista vilaĝo Volendam. Per tramo ni atingis Edam kun ĝiaj mondkanataj fromaĝoj; de tie ni vojaĝis Alkmaron, kie ĉiuvendrede okazas fromaĝa borso, kiu, kiel antaŭ jarcentoj, alkondukas milojn da turistoj.

Per tre malmoderna vaportrajno, tie nomita tramo, ni alvenis al Bergen sur Maro, kie multaj unuafoje trempetis sin en sala akvo. Fine aŭtobuso kondukis nin al Aalsmeer, kie ni vizitis florborson k florkulturon. Post tuttaga restado en Hago ni atingis vespere Roterdamon, kie nin ree atendis gekamaradoj. Invitoj en hejmon, ŝipa rondiro tra la haveno k aŭtobusa tra la urbo (karavano de 38 aŭtobusoj!), k lasta nederlanda vespero en laborista esp. grupo sud-kvartala.

La nederlandanoj vivas en pli bonaj kondiĉoj ol la svisoj, k ankaŭ pli simple. Ili loĝas en belegaj, komfortaj domoj, vivas prefere hejme ol en kafejoj aŭ kinejoj. La laboristaj salajroj estas malaltaj, sed ĉio estas malmultekosta. Unuvorte, ili ŝajnas feliĉaj.

En Belgio ni restis nur tri tagojn (Antverpeno k Bruselo). Ni trovis ĉion altpreza, sed ne havis multajn kontaktojn, sekve ne povas prijuĝi la vivkondiĉojn. La vojaĝo daŭriĝis al Strasburgo, kie ni vagadis dum du tagoj tra la urbo. Ni tagmanĝis kun angla karavano el esperantistaj infanoj survoje al Aŭstrio (junulara kongreso).

Dank' al esperanto bela vojaĝo finiĝis (ni revenis tra Bazelo). Specialan dankon al k-doj Berger (Kolonjo), Bultemeijer, v. Munster, Aarse, v. Leeuwen (Amsterdamo), Friedling (Alkmaro), v. d. Laarse (Aalsmeer), Mes-Gosen k de Haan (Rotterdam), Coen k Debaene (Bruselo), Zipfen (Strasburgo), la grupoj de Kolonjo, Ehrenfeld, Amsterdamo, Edamo k Roterdamo. Al ĉiuj mi diras — ĝis revido en Svisio!

P. Arbenz (15.390)



LIBERPENSULA ANGULO

Liberpensismo en Nederlando

Kiel jam komunikite en „S-ulo“, en Nederlando ekzistas, krom la liberpensula organizo „De Dageraad“ („La Tagiĝo“) fondita en 1856, kies membroj estas ateistoj, agnostikoj k.s., ankaŭ la postmilita Humanista Ligo, kies anoj konsistas el ekster-ekleziuloj.

Ne ĉiuj en tiu ĉi organizo deklaras sin esti sendiuloj; multaj estas religiaj sed aliaj ateistoj aŭ agnostikoj. La lastnoma organizo kelkfoje jam deklaris sin preta kunlabori kun eklezioj, ekzemple rilate pacon aŭ forigon de haoso. „De Dageraad“ kunlaboras tamen neniam kun eklezioj; pro sia centjara laboro kontraŭ-religia ĝi multe kontribuis pasinte ankaŭ al la disvastigo de la socialista ideo en Nederlando.

La H.L. kiu regule kreskas, fariĝas iom post iom tro danĝera — en la okuloj de la katolika pastraro — por ankoraŭ-kredantoj, kiuj tamen fariĝas dubaj pri la „vero“ al ili predikata. La pastraro timas, ke la H.L. iĝos tre alloga por dubemuloj, tial ĉiel oni klopodas malplifortigi ĝian influon.

Antaŭ nelonge aperis en katolika ĵurnalo ĉefartikolo kontraŭ la H.L., en kiu la verkisto skribas: „la katolikoj devas ŝirmi la „kredantajn ŝafojn“ kontraŭ la agado de la H.L. (kies membroj estas „lujoj en ŝafvestaĵo“) deziranta fortiri la kompatindajn ŝanceliĝulojn el la katolika eklezio, tiel gvidante ilin al la infero.“ Ĉiuj katolikaj organizoj forte protestas ĉe registaraj instancoj kontraŭ la provoj de la humanistoj akiri pli da influo en la armeo k.a., k denove montriĝas, ke Romo estas netolerema rilate la mondkoncepton de alipensantoj; ĝi havas la ununuran „veron“, kiun ĝi defendas ĉiel k ĉial, se necese, per plej teruraj rimedoj. (Vidu ekzemple la okazojn en Hispanio k sud-amerikaj respublikoj katolikaj.)

Car la rom-katolika sinteno estas granda danĝero en la tuta mondo por la libero de alipensantoj, ni liberpensuloj-ateistoj kungrupiĝu k, ankaŭ pere de nia komuna lingvo, esperanto, publikigu la al ni konatajn faktojn pri la fiagado de la romkatolika sekvantaro, kie ajn ili okazas. Gekamaradoj, aniĝu al la liberpensula frakcio en SAT k anoncu vin ĉe la landaj perantoj:

Francio: Gay Andreo, strato Lambert Dumesnil, Herblay, (S. & O.).

Germanio: Weichmann Eduardo, Dortmund-Kirchderne, Losenkamp 4.

Nederlando: Liedermooij J. St. Camer 76, De Bilt (U.).

Sarlando: Burger Josefo, Klarenthal/Saar, Warndstrasse 81.

J. L. (23835)

Ankaŭ en 1954 aperos kajero ampleksa de

SENNACIECA REVUO

Pagante vian kotizon, pensu pri la ebleco akiri ĝin je favora tarifo. La kajeroj 1952 k 1953 estas ankoraŭ haveblaj.

Pokajera prezo: 0.50 dolaro.



La alia pasinteco de Rico Bulhuis, trad. el la nederlanda Julia Isbrucker; formato 13 x 19,5 cm, 292 pg.; bindita kun bilda surkovrililo; eld. Internacia Esperanto-Instituto, Hago, 1952; prezo: 4.90 gld. (plus afranko).

La originala romano estis verkita de juna literaturisto, kies nomo ne estas nekonata al la esp-istoj: li efektive estas la filo de nia bedaŭrata samideano Hendrick Bulhuis, al kiu ni ŝuldas interalie la tradukojn de „Imperiestro k Galileano“ de Ibsen, „La Leono de Flandrujo“ de Conscience, k la originalajn romanojn „Idoj de Orfeo“ (1923) k „La Vila Mano“ (1928).

La verko de lia filo estas, el la vidpunkto teknika, pli bona ol tiuj de la patro. Ĝi estas en si mem ia detektivromano miksa kun kurioza k tre lerta studo pri psikiatrio. Temas pri kazo de amnezio k pri la longa, angora esploro, per kiu la malsanulo iom post iom sciigas pri la stato, sia suspektateco, streĉas sian spiriton al retrovo de fuĝintaj memoraĵoj, k finfine resaniĝas, malkovrante, ke li ne estas kulpa k ke tiu amnezia atako estis nur provo de lia subkonscio por subpremi malplacajn vivospertajojn. Mi eble malpravus, resumante tiel abstrakte la rakonton, ĉar ĝi povus fortimigi kelkajn legantojn: mi devas diri, ke, tute male, ĝi estas tre viva, realista k atentokapta — la neordinare bona romano.

La tradukon faris s-ino Isbrucker facila k stilflua; enestis ne malofte iaj malfacilaj esprimoj el la kuranta vivo, malfacilaj teknikaj de la ĉiutaga moderna nia vivo: ilin la tradukinto lerte venkis, k oni ne rimarkas eĉ la penon. Aliflanke, mi devas konfesi, ke mi ne ŝatas, kvankam Zamenhofan, la uzon de lasi anstataŭ igi, ĉar ĝi estas tre konfuza: „Versajne, oni lasis min sekvi“ (p. 88) ŝajne signifas: „oni ne malhelpis min sekvi“, dum la senco estas: „oni igis (policiston) sekvi min“. Alia tikla punkto estas la uzado de pasinta tempo anstataŭ prezenco en la eksplikaj aŭ demandaj subpropozicioj („nereakta parolo“). Ekz-e: „(la kuracisto) devis fini la provon kun nur unu absolute pozitiva rezultato: mi ne estis simulant“ (p. 51: „mi ne estas!“); „mi vidis, ke li mallaŭte parolis kun la knabino“ (p. 81: „parolas!“). Tiun eraron oni renkontas ĉ. 20 fojojn en la libro, k ĝi estas verŝajne kaŭzita de troa rapideco en la tradukado. La ĝusta uzado de tiuj relativaj tempoj estas eble iom delikata (kvankam perfekte logika k klarigibla), sed ĝi estas nepre necesa por atingi perfektan korektecon lingvan. G. Waringhien.

L. Wegener: La Arto fariĝi centjara. 60 pg., form. 12 x 18,5 cm. Prezo: gmk. 1.20. Eld.: Limburger Vereinsdruckerei, Esp.-Fako.

Pri la maniero resti juna longtempe la aŭtoro (kiu estas kuracisto) verkis ĉi tiun broŝuron kun multaj bonaj konsiloj k rekomendoj, recipe rilate nutradon. D-ro Wegener estas vegetarano k montras ankaŭ la difektojn, kiujn kaŭzas alkoholo k tabako. Libreto rekomendinda ankaŭ pro sia klara, senriproĉa e.p.-lingvo.

La sama eldonejo prezentas germanlingvan afiŝon por esperanto k bildpoŝtkartoĝ pri D-ro Zamenhof (prezo de l' unua: 0.60, — 5 = 2.50 gmk., de l' dua artikolo: 1 ekz. 0.20 mk., 10 ekz. 1.80; 50 ekz. 7.50).

K. Vanselow: Nia Lingvo Esperanto, elektita poezio por deklamo k por kanto. 4-a kajero (unua de la dua serio). Pecoj n-roj 126-165. Ni konfirmas, kion ni jam diris: el la multo da tradukoj, adaptaj aŭ originaloj, ne ĉiuj estas egalvaloraj, sed iuj tre sukcesintaj. Cetere ne ĉio estas kantebla, kiel ekz. la tradukpartoj el verko de l' humoristo Busch. — Prezo 2 resp. kuponoj, por tuta serio (3 kajeroj) 5 resp. kuponoj.

Bonn. La parlament-urbo de okcidenta Germanio, apud la Rejno, aperigis du gvidlibretojn, kiuj enhavas ankaŭ esp. lingvajn klarigojn. Eld. Städt. Verkehrsamt, Bonn. Haveblaj kontraŭ resp. kupono ĉe E. Kind, Nordstr. 97, Bonn.